


Voĉdono por nova federacia konsilio 2010 EDE-EU

Karaj geamikoj,

Okaze de la ĝenerala asembleo okazonta la 18-an de aprilo 2010, la agada kaj financa raporto de la federacio EDE estos prezentitaj al la membroj kaj la konsisto de la estraro kaj administra konsilio estos ŝanĝitaj.

**Kiam kaj kiel okazos la ĝenerala asembleo ?**

La ĝenerala asembleo okazos la 18-an de aprilo ekde la 10-a horo (laŭ mezeŭropa horo) per Skajpo (reta telefonprogramo). La koncernan horon kontaktu 'edebanne' en Skajpo. Se la sona kvalito estas tro malbona, ni daŭrigos skribe en Skajpa tajpfenestro.

**Kiam kaj kiel oni voĉdonos ?**

La voĉdono okazos interrete dum la antaŭaj tagoj, precize de la 5-a de aprilo ĝis kaj inkluzive de la 15-a de aprilo. Ĉiu voĉdonanto devos indiki sian nomon kaj landan sekcion por kontroli ke ŝi aŭ li rajtas voĉdoni. Tiuj informoj estos videblaj kaj kontroleblaj nur de la estraro. Specialan retpoŝtadreson por voĉdoni oni konigos al vi je la lanĉo de la baloto. Tiuj informoj ne estos komunikitaj ekster la estraro.

**Kiuj rajtos voĉdoni ?**

Kiuj rajtos voĉdoni estas kotizintoj ĉe naciaj sekcioj (Germanio, Francio, Hungario), kondiĉe ke ili kotizis en 2009 aŭ en 2010 antaŭ la 28-a de marto. Nun bedaŭrinde ne ekzistas ebleco esti membro de la federacio sen esti membro de landa sekcio. Oni ŝanĝos la internan regularon por tion ebligi ĝuste dum la venonta ĝenerala asembleo.

**Pri kio oni voĉdonos ?**

Membroj de landaj sekcioj voĉdonos pri la agada kaj financa raportoj, pri la interna regularo kaj pri la suplementaj kandidatoj al la Administra Konsilio. La Administra Konsilio konsistas el 9 reprezentantoj de la landaj sekcioj kaj el 4 suplementaj konsilianoj. Oni voĉdonos okaze de la ĝenerala asembleo nur por la suplementaj konsilianoj. La 9 reprezentantoj estos nomumitaj de la landaj sekcioj (3 por Germanio, 3 por Hungario kaj 3 por Francio).

**Kiuj rajtas kandidatiĝi al la Administra Konsilio ?**

Ĉiuj EU-anoj loĝantaj en EU rajtos kandidatiĝi por posteno en administra konsilio por la 4 suplementaj konsiliaj postenoj. Por kandidatiĝi, vi devas skribi mesaĝon **antaŭ la 28-a de marto** al la sekretario de EDE (redakcio @ e-d-e.org). Via kandidatiĝo estos plusendita al la estraro de via landa sekcio (se vi kandidatiĝas kiel reprezentanto de via landa sekcio) aŭ ĝi estos proponata dum la balotoj se vi ne estas membro de landa sekcio.

En via mesaĝo, vi priskribos kiu vi estas, kion vi atendas de la federacio, kion vi volas fari por ĝi kiel elektito. Vi uzos maksimume 80 vortojn.

Ĉiu landa konsilio rajtos elekti po 3 reprezentantojn el la naciaj kandidatoj. La landaj sekcioj faros tiun elekton plej malfrue la 4-an de aprilo. El la ceteraj kandidatoj ne elektitaj de la konsilioj de la landaj sekcioj kaj la kanditatoj, kiuj ne membras en EDE-sekcia lando, 4 kromaj federaciaj konsilianoj estos elektitaj per voĉdono de la federaciaj membroj.

Kore salutas vin Fabien Tschudy, sekretario de la federacio EDE-EU.